

V - 16730/29 (1949)

# Nederlanda Katoliko

MAANDBLAD VAN DE NED. BOND VAN KATHOLIEKE ESPERANTISTEN  
„NEDERLANDA KATOLIKO”, GEVESTIGD TE 's-HERTOGENBOSCH

Bisschoppelijk en Koninklijk goedgekeurd. Ogericht 29 Augustus 1909

SECRETARIAAT EN REDACTIE: A. F. LEIDERITZ Jr. — VECHTSTRAAT 5 — AMSTERDAM-Z.  
VASTE MEDEWERKERS: J. S. JANSSEN — AMSTERDAM EN Dr. W. J. A. MANDERS — VENLO

## ECCE HOMO

La okul' radias pro boneco.  
Tiel nur suferas Diofilo!  
Kiaj pacienc' kaj heroeco!  
Jen postsignoj ĉie de l' batilo.

Tolereme Li elverŝas sangon,  
Li mem, kiu de l' ĉielo venis.  
Murdbubaĉoj batas Lian vangon -  
Kaj mi, la pekulo, - partoprenis!

D-ro Ruperto Scheucher

## De Bondsjaarvergadering

VOORSTELLEN voor de jaarvergadering op 24 April  
a.s. te Eindhoven.

### APELDOORN

1. Zolang I.K.U.E. geen eigen blad kan uitgeven, zal N.K. door een „internacia komunikilo” het contact tussen alle katholieke esperantisten onderhouden.
2. N.K. verhoeg zijn bijdrage aan I.K.U.E. op voorwaarde, dat dit geld wordt aangewend tot onmiddellijke internationale actie.

### Toelichting:

Wij hebben geen Esperanto geleerd om in Nederland vergaderingen en herdenkingsbijeenkomsten te houden, noch om een maandblaadje te lezen, waarin andere Nederlanders Esperanto schrijven.

Wij wensen Esperanto te gebruiken om internationaal contacten tot stand te brengen. Al het overige is van ondergeschikt belang.

Daarom zijn we tegen een lapmiddel in de vorm van een vergroot N.K.-blaadje. Daarom zijn we tegen een concentratie van alle krachten om de Nederlandse bond groter te maken.

Om het internationaal contact te herstellen offeren we gaarne de geringe voldoening van een grootse herdenking en van een aardig Nederlands maandblad.

### BERGEN OP ZOOM

1. De algemene vergadering drage het hoofdbestuur op met spoed stappen te doen om „Espero Katolika” niet meer verplicht te laten abonneren door alle leden van de bond en dienovereenkomstig de contributie te verlagen.

2. De algemene vergadering drage het hoofdbestuur op toe te zien, dat de functies van voorzitter van „Nederlanda Katoliko” en die van secretaris-penningmeester van I.K.U.E., ingaande heden of heel spoedig niet meer in één persoon verenigd blijven.

### Toelichting:

Deze voorstellen werden door ons twee jaar geleden ook reeds ingediend.

### EINDHOVEN

1. *Verschijsning „Nederlanda Katoliko”.*

Voorlopig verschijsne het bondsorgaan éénmaal in de twee maanden ofwel 6 maal per jaar. In de maanden, dat het bondsorgaan niet verschijsnt, worde, ter vervanging daarvan, door het bestuur een circulaire samengesteld.

Deze circulaire worde gecyclostyleerd uitgegeven.

### Toelichting:

Volgens de circulaire, welke in Februari 1949 door de bondsvoorzitter verzonden is, stelt het hoofdbestuur voor de contributie te brengen op vier gulden per jaar.

Daar door de tijdsomstandigheden onze leden gedwongen zijn hun uitgaven drastisch te beperken, moet ook „Nederlanda Katoliko” de uitgaven drukken.

Dit is ondermeer te bereiken door het aantal nummers van het bondsorgaan te beperken.

Daar het wenselijk is, dat de leden elke maand een medelingenblad ontvangen, kan in de maanden tussen twee nummers van het bondsorgaan een gecyclostyleerde circulaire worden samengesteld.

Door deze beperking en door eventueel het bondsorgaan in één of twee nummers in een omvang van vier bladzijden te laten verschijsnen, kan de contributie gehandhaafd blijven op twee gulden per jaar.

2. *Statuten en huishoudelijk reglement.*

De vergadering geve het bestuur opdracht om de statuten en het huishoudelijk reglement te herzien en een concept daarvan aan de volgende jaarvergadering voor te leggen.

### Toelichting:

Op de jaarvergadering te Utrecht is het wenselijk gebleken om de statuten en huishoudelijk reglement te herzien. Tot nu toe is echter nog geen concept hiervan gepubliceerd.

### UTRECHT

N.K. heeft A- (actieve/aktivaj) en S- (steunende/subtenantaj) leden.

Actieve leden betalen aan de bond per jaar f 4.— contributie. Afdelingen van de bond dragen voor hun actieve leden f 3.— per jaar aan de bonuskas af. Steunende leden betalen aan de bond per jaar f 1.— contributie. Afdelingen van de bond dragen voor hun steunende leden f 0.80 per jaar aan de bonuskas af. De actieve leden ontvangen het bondsorgaan „Nederlanda Katoliko”, dat voorlopig om de maand, bij voorkeur in de oneven maanden, verschijne. De steunende leden ontvangen alleen het bondsorgaan-nummer, dat op de bondsjaarvergadering betrekking heeft en welk nummer geheel in het Nederlands gesteld worde.

Het jaarboek van I.K.U.E., op welks spoedige verschijning N.K. aandringt, bevatte de namen van de A.- en S.-leden. De namen van de actieve leden worden met A gekentekend. A.-leden ontvangen het jaarboek zo mogelijk gratis. S.-leden tegen de helft van de kostprijs.

De S.-leden hebben tot alle vergaderingen van de afdeling en de bond evengoed als de A.-leden toegang. Het stemrecht worde alleen aan de actieve leden toegekend, terwijl de steunende leden eventueel een adviserende stem verleend worde. Het aantal stemmen, dat een afdeling over bondsaangelegenheden uitbrengt, worde alleen naar het aantal actieve leden bepaald.

#### Motivering:

Een bond geniet in het algemeen waardering naar hetgeen hij, dank zij een groot aantal leden bereiken kan. Door de wisselvalligheid en onzekerheid, welke deze eeuw tot nu toe kenmerken, kon onze Esperantobond niet tot flinke groei komen. Weer klinkt de roep tot versobering en spaarzaamheid. Het is dus niet aannemelijk, dat er spoedig voor onze bond groei zal komen als we niet in de macht van het kleine geloven. De jaarvergadering stelle de contributie daarom voorlopig zo laag mogelijk vast. Door het steunende lidmaatschap in te stellen, wordt de mogelijkheid tot terugwinning van veel verloren leden geschapen. Zien deze steunende leden, dat er leven in de bond is, dan is een actief lidmaatschap, gezien de lage contributie, slechts een kleine stap. Verkrijgt de bond door een toenemend aantal leden grotere inkomsten, dan wordt daardoor grotere activiteit mogelijk. Bij anneming van dit voorstel dienen statuten en huishoudelijk reglement hiermede in overeenstemming te worden gebracht.

#### VOORSTEL HOOFDBESTUUR:

De algemene vergadering stelle de bondscontributie vast op f 4.— per lid per jaar.

Amendementen op bovengenoemde voorstellen kunnen tot 1 April e.k. bij het bondssecretariaat worden ingezonden.

In de hoofdbestuursvergadering van 2 April a.s. zal het hoofdbestuur zijn prae-adviezen samenstellen en de volledige agenda opmaken, welke in het orgaan van 15 April zullen worden opgenomen.

Twee leden van het hoofdbestuur, n.l. de bondssecretaris de heer A. F. Leideritz en mej. T. Durenkamp, treden reglementair af. Alleen laatstgenoemde stelt zich herkiesbaar.

Candidaatstellingen kunnen tot 1 April a.s., vergezeld van een bereidverklaring, worden ingediend bij het bondssecretariaat.

A. F. L.

## FESTVESPERO DE „SUDA KRUCO” k.t.p.

Kadre de la jarkunveno de „Nederlanda Katoliko” je la 24-a de aprilo en Eindhoven, organizos la loka klubo „Suda Krucio” grandskalan festvesperon okaze de la 25-jara ekzistado de la klubo. La festo komenciĝos je la 7.30 horo vespere de la 23-a de aprilo, do en la antaŭa vespero de la jarkunveno. Oni prezentos amuzan, artan sed ankaŭ seriozan festvesperon. Se la planoj glate disvolviĝos, oni povas kalkuli je memorinda, suda festvespero esperanta.

Interlige kun ĉi tiu festvespero la diversaj deputitoj kaj vizitantoj el la landaj kluboj, kiuj ĉiuj kompreneble ĉeestos ĉi tiun vesperon, la klubo intencas aranĝi komunan kafotablon je la 24-a kaj prizorgi la tranoktadon de la venontaj petontoj.

Prezoj de la tranoktado kun mantenmanĝo: mezpreze f 3.50.

Prezo de la kafotablo: f 2.00 (ne pli, povas esti malpli).

Anoncado de partopreno por ĉiu afero aparte ĝis la 22-a de aprilo venonta ĉe: M. T. Aerds, Geraniumstraat 7, Eindhoven. Venu amase! Ĝuu kun ni! Vivigu Esperanton! Estu ĝojaj!

BUREAU „ESPERANTO BIJ HET ONDERWIJS”  
Cornelis Krusemanstraat 43 - Amsterdam-Z.

#### VERSLAG

#### VAN DE ACTIE „RAKE KLAP, TWEDE STAP”

In zijn vergadering van 12 Mei 1948 besloot het bureau zo mogelijk een nieuwe actie in te zetten bij Regering en Kamer en daarbij dan te trachten de in ons land voor ons streven wel aanwezige sympathie tot uiting te brengen. Aangezien de middelen van het bureau zelf echter geen behoorlijk opgezette actie toelieten, zou het nodig zijn te proberen een speciale financiële bijdrage daarvoor van de georganiseerde esperantisten los te krijgen.

Zo verscheen midden 1948 de „Oproep aan de Nederlandse Esperantisten” van het „Centraal Comité van de Esperanto-beweging in Nederland”, waarin een beroep op de offervaardigheid der leden werd gedaan. En niet tevergeefs! Wel werd het gestelde doel niet bereikt, maar het eindresultaat was niet onbevredigend. Hieronder vindt U de bijdragen, die door de Esperanto-organisaties werden bijeengebracht.

L.E.E.N. <sup>1)</sup>	f 1.222.55
F.L.E.	f 839.37
N.K.	f 159.30
N.C.E.V.	f 87.00
De Esperantist	f 8.00
	<hr/>
	f 2.316.22

<sup>1)</sup> Hierbij inbegrepen enkele rechtstreeks ontvangen bijdragen, verantwoord in „Nederlanda Esperantisto”.

**Maakt U reeds propaganda voor onze N.K.-cursus!**

En nu zullen vooral de goede gevers wel nieuwsgierig zijn te weten, wat er met hun geld gedaan is.

Na nader overleg heeft het bureau zich gewend tot de Minister van O., K. en W. met het verzoek „het Esperanto zo spoedig mogelijk te doen opnemen als verplicht leervak in het onderwijsprogramma van alle kweekscholen voor onderwijzers en onderwijzeressen in ons land". Dit verzoek werd 1 November 1948 verzonden.

Reeds in September daarvóór ontvingen alle afdelingen van de bij het bureau aangesloten organisaties een circulaire, waarin het doel van de actie uiteengezet was, op medewerking werd aangedrongen en verteld, wat de afdelings-besturen en leden moesten doen.

Over deze medewerking kunnen we in het algemeen niet pochen. Enkele gunstige uitzonderingen daargelaten, hebben de esperantisten zelf weinig van zich laten merken. In de gemeente Noordijk heeft één het karweijsje alleen opgeknapt, en met succes. Van de weinige plaatselijke commissies, die op ons verzoek werden opgericht willen we die in Amersfoort noemen, die voorbeeldig heeft gewerkt. De geringe plaatsruimte belet ons hier meer te noemen, doch we betuigen aan allen, die hun taak in deze gedaan hebben onze hartelijke dank. Toch moet het ons van het hart, dat we overtuigd zijn dat het totaal succes van onze actie nog beter zou zijn geweest indien meerdere esperantisten hun plicht hadden gedaan. Een ere-salut nog aan de afdeling Monnikendam van de Ned. Onderwijzers-Vereniging, die zorgde, dat de gemeenteraad van Monnikendam de eerste was waarvan we een sympathie-betuiging ontvingen.

Dit gebrek aan medewerking deed wat pijnlijk aan bij de ondervonden steun van organisaties, die niet bij het bureau zijn aangesloten. De aangesloten verenigingen bekostigden en verzorgden zelf de verzending van onze enveloppen „met inhoud", maar hetzelfde deden ook geheel of gedeeltelijk het Nederl. Verbond van Vakverenigingen en de Partij van de Arbeid, terwijl de Katholieke Volkspartij afdelings-adressen beschikbaar stelde.

Ook daarvoor wensen we hier onze dank te betuigen. Het nevendoeel van onze actie was de mobilisering van de publieke opinie. Daartoe werden aan ca. 650 gemeenteraden verzoeken gestuurd om adhesie aan ons request aan de Minister te verlenen. We stelden ons voor, dat zodoende in talrijke gemeenten onze zaak publiekelijk aan de orde zou worden gesteld en dat vele plaatselijke bladen daarover langer of korter zouden rapporteren. Daarin zijn we niet teleurgesteld. We hebben tal van knipsels ontvangen, die ons van de behandeling in een raadscollege verslag brachten. Ook dat aantal knipsels had trouwens groter kunnen zijn.

Om U enig idee te geven van het verzette werk de volgende gegevens. Behalve de verzoeken aan de gemeenten, die vergezeld gingen van propaganda-materiaal, ontvingen honderden afdelingen van onderwijs-, politieke en vakorganisaties een enveloppe gevuld met circulaire en brochures. Bij de verzending daarvan hebben verschillende Amsterdamse esperantisten en zelfs Deense de behulpzame hand geboden. In totaal zijn 4300 enveloppen met 33000 stuks circulaire en brochures, waarvan sommige eerst herdrukt moesten worden, de deur uitgegaan. Bovendien werden door de Nederlandse Ouderraad voor de Openbare Lagere Scholen 1350 circulaire aan oudercommissies verzonden.

Nu weer die gemeenteraden. Wat het uiteindelijk resultaat zal zijn, is nog niet te zeggen. De stroom van

antwoorden vermindert nu, ofschoon er nog bijna elke dag binnenkomen.

Ontvangen zijn in totaal 284, waarvan 105 gunstig. Onder de weigeringen is een aantal, waarin we verwezen worden naar de Vereniging van Nederlandse gemeenten. Twee gemeenten hebben de zaak daar zelf aanhangig gemaakt. Alles met elkaar naar onze mening uitstekend. Wij concluderen, dat we erin geslaagd zijn te bewijzen, dat (zoals we aan de gemeenten schreven) een aanzienlijk deel van het Nederlandse volk de invoering van het Esperanto wenst.

Voorals als we zien dat bovendien de volgende organisaties sympathiebetuigingen hebben gezonden: De Communistische Partij Nederland, de Nederlandse Groot-Loge der Internationale Orde van Goede Tempeliers, de Vereniging van Arbeiders Radio Amateurs, de Arbeiders Jeugd Centrale, de Nederlandse Bond van Vrije Socialisten, het Nederlands Verbond van Vakverenigingen en de Broederschapsfederatie.

(Slot volgt.)

P. W. BAAS, voorzitter.

## HOOFDINSPECTEUR VAN HET LAGER ONDERWIJS OVER ESPERANTO-ONDERRICHT

Het Bureau „Esperanto bij het Onderwijs" ontving de volgende verklaring:

Groningen, 24 Januari 1949.

Esperanto is naar mijn mening de aangewezen taal voor velen, die met mensen van verschillende nationaliteit willen (en vaak moeten) corresponderen en spreken.

Ik wens het Bureau „Esperanto bij het Onderwijs" dan ook gaarne succes toe in zijn streven, deze wereldtaal te doen opnemen onder de leervakken van het voortgezet- en uitgebreid lager onderwijs.

L. F. KLEITERP,

Hoofdinspecteur van het Lager Onderwijs  
in de 3e Hoofdinspectie.

## EKZAMENA KOMITATO

La estraro de la ekzamena komitato konsistas en 1949 el s-ro P. Heilker, prezidanto, f-ino H. M. Mulder, Zilvermewestraat 29, Badhoevedorp, sekretariino kaj s-ro A. J. Kalma, vic-prezidanto.

En 1949 okazos ekzamenoj A kaj B la 26-an de majo en Amsterdam kaj Groningen, la 18-an de junio en Den Haag kaj la 5-an de novembro en Utrecht.

La detala prospekto estas senpage havebla ĉe la sekretariino de la ekzamena komitato kaj la sekretario de N.K.

## RONDVOJAGO TRA ĈEHOSLOVAKUJO

### I.

La redaktoro de N.K. jam kelkfoje petis min, rakonti ion pri tiu lando, kiun mi antaŭ kelkaj monatoj vizitis. Pro tempomanko mi ne tuj povis plenumi lian deziron, sed nun

mi finfine decidis, ke mi antaŭ ĉio plenumu mian promeson.

Sub gvidado de kelkaj karaj amikoj-samideanoj mi migris tra la tuta vasta respubliko, kies okcidenta landlimo distancas je 1900 kilometroj de la orienta.

La gloro de la ĉefurbo „Panjo Praha” kun siaj cent turoj, belege ŝtona Karlo-ponto trans la rivero Vltava, preĝejoj kaj kapeloj en la diversaj konstruajmodoj de multaj jarcentoj, precipe en rica baroka stilo, kun la glora katedralo de Sta. Vito, la belega Strahov kaj la intima Loreto kun siaj artricajoj, la majesta kastelo Hradcany, la beleaj parkoj kaj la alte situanta enterigejo Vysehrad, kie ripozas multegaj eminentaj personoj, precipe verkistoj kaj artistoj, sub belege skulptitaj monumentoj, tiu gloro jam estas tiel ortege prikantita en ĉiuj tonoj, ke ŝajnas al mi superflue, ankoraŭ ion skribi pri tio, kvankam la plej longa homa vivo estus tro mallonga por detaile pririgardi kaj pristudi ĉiujn tiujn belegajn. Mi nur menci, ka la belega antikva urbodomo, kiu dum la revolucio kontraŭ la Germanoj en majo 1945 estis severe difektata, nun estas riparata kaj ĝia famkonata horloĝo intertempe restarigita en sia antaŭa formo.

En ĉi tiu je arkitekturo kaj naturbelegaĵoj tiel riĉa lando troviĝas ankoraŭ multaj aliaj vidindaj urboj. Kutna Hora, la antikva mezepoka reĝurbo, posedas sian belegan gotikan katedralon de Sta. Jakobo kaj sian famkonatan bohem-gotikan Sta. Barbara'n, ambaŭ el la 14a jarcento, kun valoraj altaroj, freskoj, skulptaĵoj kaj paramentoj, kaj ankoraŭ multajn aliajn monumentojn el la 12a kaj 14a jarcentoj. Eĉ la pavimoj estas zorge konservitaj en sia mezepoka formo, kio ne estas tre agrabla por moderne ŝuitaj virinaj piedoj! Ĉirkaŭ la urbo estas riĉaj arĝentminejoj kaj je kelkkilometra distanco dormas la urbeto Sedlec kun sia katedralo Sta. Maria, konstruita en la 12a jarcento de Cisterciensaj monaĥoj kaj riparita en la 14a jarcento. Ĝi estas la plej longa preĝejo de la lando kaj havas mezan kaj kvar flankajn navojn. Tuj apude estas la enterigeja kapelo kun kripto, en kiu ĉiuj ornamaĵoj konsistas el homaj ostoj. Aliaj tre vidindaj urboj en Bohemio estas i.a. Nachod, Nove Mesto ĉe la rivero Metuje kaj Hradec Kralové, kiun oni nomas „la salono de la respubliko”. Kaj ĉiuj urboj havas belegajn ĉirkaŭaĵojn, tiel ke la urbanoj vespere povas ripozi en la bela libera naturo. Okulfrapanta estas la pureco de la stratoj kaj parkoj; ĉie troviĝas paperkorboj kun admonoj por kon-

servi la purecon, kaj kiam policisto vidas, ke iu forĵetas pecon da papero aŭ ion alian sur la straton, li tuj skribas „kuponon” por tia pekulo.

Mezepokaj pilgrimlokoj kiel Svata Hora, Staré Boleslav kaj aliaj allogas ankoraŭ ĉiam milojn da pilgrimantoj.

Brno, la ĉefurbo de Moravio, estas post Praha certe la plej bela urbo de la respubliko. Ankaŭ ĉi tie troviĝas imponaj konstruaĵoj, katedralo kaj preĝejoj kun riĉaj pentraĵoj kaj skulptaĵoj. Ni vizitis ĉi tie ankaŭ la kastelon „Spielberg”, en kiu kun multaj politikaj kaptitoj restadis dum pli ol 7 jaroj la famkonata poeto itala Silvio Pellico kaj verkis en sia ĉelo sian konatan verkon „Le mie prigione”. Oni apenaŭ povas kredi, ke en tiuj mallumaj, malvarmaj subteraj kavoj povis vivadi tiom da nobelaj, je luksa vivmaniero kutimintaj gesinjoroj dum multaj jaroj, kelkaj el ili eĉ dum pli ol 20 jaroj. En la superaj etaĝoj troviĝas muzeo, en kiu oni povas pririgardi multegajn interesajn memoraĵojn el la du mondmilitoj. Plej supre estas la ĉambroj, en kiuj dum la lasta milito restadis la politikaj malliberigitaj, el kiuj multaj estis ekzekutataj en la subteraj kavoj: memorŝtonoj kaj florkronoj daŭre atestas pri la heroeco de tiuj patriotoj.

En Olomouc ankaŭ estas multaj mirindaj aferoj; ni nur menci la katedralon kaj la vastan, belege aranĝitan parkon kun siaj diversaj monumentoj.

(Daŭrigota)

\*

Is Uw parochiehuis reeds versierd met onze propagandakaart!

\*

Prof. G. Waringhien, Leteroj de L. L. Zamenhof. La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. I 1901—1906, eldonis S. A. T., Paris 1948.

Nia organo havas nur malmultajn legantojn, kaj inter ili troviĝas nur kelkaj, kiuj havas specialan intereson pri la historia aŭ lingvistika flanko de nia movado. Anstataŭ detale recenzi la libron de Waringhien mi do kontentiĝos atentigante pri la eksterordinara historia valoro de ĉi tiu publikigo. Ĝuste leteroj povas ofte riveli la sekretajn

emociojn, la temojn kaj esperojn de la skribinto. Ili ja ne estis destinitaj por eldono kaj pro tio havas karakteron malpli retenueman kaj pli malkaŝan. Kaj des pli valoraj kaj interesaj ili estas, kiam ili — kiel tie ĉi — estis direktitaj al eminentuloj kaj temis pri gravaj problemoj. Kiuj legis la leterojn en „Originala Verkaro”, tiujn eble ĝuste tiu parto el la kolekto de Dietterle malplej kontentigis, kaj povas esti ke pro tio ili nun ne tre inklinas legi la kolekton de Waringhien. Sed la libro de Waringhien estas multe pli interesa kaj valora ol la responda parto de Dietterle, unue pro la graveco de la temoj kaj adresitoj, kaj due, ĉar Waringhien en brila maniero komentis la publikigitajn leterojn. Multaj referencoj al tiutempaj gazetartikoloj aŭ al leteroj el **Originala Verkaro** formas klarigon tiel kompletan kaj tiel trafan, ke Waringhien ne troigas nomante sian kolekton „kontinua filmo”.

**Leteroj de Zamenhof** estas emocia libro, kiun ĉiu „konscia esperantisto” legos kun granda interesiĝo, eĉ se li ne kutimas okupi sin pri la historio de nia movado.

Por tuj inter ni kiuj ŝatas profundiĝi en la lingvaj kaj historiaj aspektoj de nia movado, la verkó estas ekstreme valora, ĉar ĝi enhavas multajn novajn dokumentojn, kiuj ofte devigas nin revizii la tradiciajn opiniojn kaj vidpunktojn pri gravaj aferoj. Preskaŭ same gravaj kiel la nove publikigitaj dokumentoj estas multaj referencoj en la komentario, ĉar kvankam ili estas ĉerpitaj el revuoj kaj do ne estas „novaj”, la aŭtentikaj tekstoj plej ofte tute ne plu estas atingeblaj. Multaj citaĵoj efikas same freŝe kaj surprize kiel la unuafoje publikigitaj leteroj.

Ne nur por la historio de nia movado, sed ankaŭ por la interlingvistiko la libro de Waringhien havas grandan signifon. Jam en ĉi tiu unua volumo ni legas ofte pri reformproponoj, precipe en la korespondo kun Javal. La dua volumo ampleksos la jarojn 1906—1914 kaj temos ĉefe pri la Idoskismo kaj la kontinueco de Esperanto. El lingvistika vidpunkto ĉi tiu volumo estos verŝajne eĉ pli valora ol la unua.

Kompare kun la beletraj kaj distraj verkoj nia literaturo posedas nur malmultajn librojn kiuj serioze okupas sin pri la lingvistikaj aŭ historiaj aspektoj de nia movado. Inter ili **Leteroj de Zamenhof** meritas honoran lokon tiel same pro la graveco de la publikigitaj dokumentoj kiel ankaŭ pro la majstra komentario de Waringhien.

W. J. A. MANDERS

Rim. Ankaŭ pri la Hilelismo kaj Homaranismo de Zamenhof la libro de Waringhien donas multajn novajn detalojn. La katolikoj kiuj volas objektivite prijuĝi la koncernen zamenhofan dogmaron ne povas neglekti la ĵus publikigitajn leterojn.

W. M.

## PRI LA UZADO DE LA REFLEKSIVA<sup>1)</sup> PRONOMO EN ESPERANTO

(El „Esperantista Dokumentaro”,  
18-a U.K. 1926)

**Raporto de D-ro Walter Lippmann.  
Direktoro de la Sekcio pri Gramatiko**

S-ro Bailey diras, ke li trovis en niaj lernolibroj pli-malpli la sekvantajn „kvazaŭ-regulojn”:

1. Si ĉiam rilatas la subjekton de la propozicio<sup>2)</sup>.
2. Aliaj pronomoj ne rilatas la subjekton.
3. Si ne povas esti subjekto, nek parto de subjekto.
4. Si ne povas esti uzata por la unua kaj dua personoj.

El 139 frazoj<sup>3)</sup>, elektitaj en admirinda maniero el la verkoj de D-ro Zamenhof kaj el la Fundamenta Krestomatio, li konkludas: „La kvar diritaj kvazaŭ-reguloj ne estas devigaj<sup>4)</sup>, ĉar ili ne apartenas al la Fundamento de Esperanto; ili ne estas ĝustaj, ĉar ili ne estas konformaj al la stilo de la kreinto de Esperanto.”

Parte por modifi<sup>5)</sup>, parte por refuti<sup>6)</sup> la tezon<sup>7)</sup> de S-ro Bailey, mi uzis precipe la frazojn de li elektitajn kiel esplormaterialon kaj kiel pruvekzemplojn por la ĉi-posta artikolo:

La sintakso<sup>8)</sup> de Esperanto pli kaj pli stabiligis<sup>9)</sup>. La unuaj instrulibro estis malkompletaj; la unuaj esperantistoj disponis pri malmulte da modela literaturo kaj trovis nur tre malofte okazon por interparoli kun alinacianoj. En la Esperanto-tekstoj de la unua epoko — eble ĝis 1909 — do ne mankas neĝalaĵoj sintaksaj. Sed ili iom post iom preskaŭ tute malaperis, almenaŭ en la bona literaturo. En la pli novajn instrulibrojn pli kaj pli enŝoviĝis novaj gramatikaj reguloj deduktitaj el la reganta lingvo-uzo de la imitindaj aŭtoroj. D-ro Zamenhof mem direktis ĉi tiun evoluon. Dum kelka tempo li uzis kvazaŭ prove<sup>10)</sup> plurajn formojn por la sama esprimo, poste li elektis unu el ili kaj forlasis la alian, montrante per tio, kiun

li opinias preferinda. Ankaŭ el la konstato de tiaj preferoj naskiĝis kelkaj reguloj, kiuj ja ne estas tiel leĝfortaj kiel la reguloj de la Fundamenta Gramatiko, sed tamen estas ĝenerale atentataj kaj sekvataj. Dirado, ke ili ne estas fundamentaj, aŭ citado<sup>11)</sup> de la relative malmultaj frazoj, en kiuj D-ro Zamenhof iam ne sekvis ilin, nenion pruvas kontraŭ ilia ekzistrajto<sup>12)</sup>. Estus eble eĉ rekomendeinde, sankcii<sup>13)</sup> ilin per oficialigo<sup>14)</sup>, por plifirmigi la unuecon de la lingvouzo. Tipa ekzemplo por tio estas la reguloj pri la refleksiva pronomo.

La Fundamenta Gramatiko ne enhavas regulon pri la uzado de „si” kaj „sia”, sed en la Fundamenta Ekzercaro oni trovas multajn ekzemplojn. El ili kaj el la cetera literaturo, precipe la klasika, oni povas eltiri jenajn ĉefregulojn:

La refleksiva formo por la pronomo de la tria persono en ĉiuj tri seksoj kaj ambaŭ nombroj estas „si” kaj „sia”.

Ĝi estas uzata, kiam la pronomo rilatas al la subjekto de la propozicio, sed en dependaj partoj de propozicio decidus la logika subjekto de la dependa parto, ne la gramatika subjekto de la pendiga.

- 1) refleksiva = wederkerend
- 2) propozicio = volzin
- 3) frazo = zin
- 4) deviga = verplichtend
- 5) modifi = wijzigen
- 6) refuti = weerleggen
- 7) tezo = thesis, stelling
- 8) sintakso = zinsbouw
- 9) stabiliĝi = een vaste vorm aannemen
- 10) prove = bij wijze van proef
- 11) citado = het aanhalen
- 12) ekzistrajto = bestaansrecht
- 13) sankcii = sanctionneren, bekrachtigen
- 14) oficialigi = officieel maken

FRATO W. VAN ZON

(Daŭrigota)

### ĈU VI SCIAS?

La krimo kiu rilatas al la filatelo jam ekzistas preskaŭ same longe kiel la filatelo mem. La lerteco de poŝtmarkofalsistoj estas sufiĉe konata kaj kelkfoje okazis ke nur post ekzakta ekzameno la spertekompetentuloj konstatis ke la marko estas falsa. Diversaj grandvaloraj poŝtmarkoj estas falsitaj, kio

tre malutilis la filatelistojn, ĉar la falsajoj estas, kompreneble, senvaloraj.

La falsado de poŝtmarkoj ne ĉiam malutilis nur la filatelistojn, en kelkaj landoj krome la poŝto spertis malprofitojn pro la laboro de la falsistoj, kiuj kelkfoje nekompetente kopiis la cirkulantajn poŝtmarkojn kaj cirkuligis la falsajojn.

Alia sistemo de fraŭdo kiu malutilis la poŝton estas la jena: ĝi precipe rilatas al la poŝtmarkoj de Indonezio. Multaj filatelistoj, precipe la amatoroj, kiuj ne scias tion, spertis ke la koloroj de la poŝtmarkoj, uzitaj en Indonezio, grandparte kaj kelkfoje tute malaperas kiam la koverto kun la poŝtmarkoj estas metataj en la akvon por ke la markoj malgluiĝu. Montriĝas ke ankoraŭ multaj, eĉ filatelistoj, ne scias la kialon de tiu senkoloriĝo en la akvo; multaj ne scias ke fraŭdo estas la kaŭzo de tiu ĉi propreco. Oni konstatis ke la poŝtmarkoj en Indonezio plurfoje estis uzataj, precipe de tie loĝantaj Ĉinoj. La adresanto afrankinte la leteron surŝmiris la poŝtmarkojn per diafana substanco, tiel ke nevidebla tavolo kovris la markojn. Kaŭze de tio la poŝtstampo ne tuŝis la markojn, sed nur la diafanan tavolo. Metite en akvon tiu tavolo (kun la stampo) solviĝis; la poŝtmarkoj malgluiĝis, kaj „nestampitaj” ili estis denove uzeblaj por afranki leterojn.

Post kiam la trompo konatiĝis tiu fraŭdo estis malhelpata, ĉar ekde tiu tempo la poŝtmarkoj de Indonezio senkoloriĝas en la akvo.

J. S. JANSEN

### CORRESPONDENTIE-MAPJE

inhoudende:

- 10 vel Esperanto-briefpapier \*);
- 10 Esperanto-enveloppen \*);
- 5 fotokaarten Nederland;
- 5 gekleurde reproducties Nederlandse schilders, alles met Esperanto-tekst;
- 100 Esperanto-sluitzegels.

\*) Met of zonder kruisje, naar keuze.

Prijs f 1.50 franco

Mendu ĉe la Libro-Servo de  
„Nederlanda Katoliko”,  
Kasperspad 91 — Dordrecht

